

**Prenu mian vorton**  
**Aŭtora rajto © Richard S. Forsyth, septembro 2017**

**Resumo**

Tiu ĉi artikoleto skizas metodon perkomputilan por helpi superiri unu el la baroj al la akcepto de internacia helplingvo, kaj tiel proksimiĝi al la revo de Zamenhof -- koncizan uzeblan vortaron por internacia interkomunikado. La metodo de "Lingloss":

1. Establi liston de necesaj signiferoj (signifer-aron).
2. Trovi tradukekvivalentojn de ili en kelkaj ekzistantaj lingvoj.
3. Por ĉiuj eroj trovi la plej tipan inter la alternativoj laŭ objektiva mezuro.
4. Plitaŭgigi ties 'tipecon' per sistemaj karaktromanipuloj.

Rilate al tio, multa laboro jam estas farita por kodigi la signifaron. Mi konas ses seriozajn klopodojn je tiu tasko (Ogden, 1937; Eaton, 1940; Hogben, 1963; Macmillan, 2002; Longman, 2003; Nerrière & Hon, 2009) de kiu oni povas atingi ĝeneralan konsenton per elekti terminojn, kiujn okazas en du aŭ tri el ses listoj.

La noveco estas simpla proceduro por 'averaĝigi' vortojn. Kiam ni havas nian signifaron -- en la angla, ekzemple -- ni akiras tradukojn en pluraj aliaj lingvoj. La sekva paŝo uzas mezuron de teksta simileco por elekti, por ĉiu ero, 'vortan mezumon'. Ekzemple, aplikante ĉi tiun proceduron al la vortoj por 'juna' en kvin latinidaj lingvoj kaj la latina,

['jeune', 'joven', 'giovane', 'jovem', 'tinar', 'iuventus']

ni trovas ke

'joven'

estas la plej 'tipa', laŭ ĉi tiu pritaksa sistemo. Ĉitiuokaze la hispana vorto estas la 'vorta mezumo'. Poste serĉeto estas farata pri ĉiu 'averaĝa' termino por vidi ĉu malgrandaj mutacioj pliigas la gradon de simileco. Se jes, la modifita versio estas konservita, alie la originala termino, kaj tio fariĝas nia internacia radiko. En la supra ekzemplo ĉi tiu proceduro ŝanĝas 'joven' al 'jove', kio ilustras, ke la rezulto ne necesas ekzisti jam en unu el la fontaj lingvoj. (Ĝi tamen ekzistas en la kataluna.)

Tiel, unuafoje en interlingvistiko, la elekto de vortareroj povas baziĝi sur refareblaj kriterioj anstataŭ subjektiva juĝo. Mi jam efikigis unu poentkalkulan sistemon en Python3. Mi ne insistas, ke ĝi estas la plej bona kion oni povas fari, tial la programo publikiĝos por ebligi plibonigojn.

**Referencoj**

Eaton, H.S. (1940). *An English French German Spanish Word Frequency Dictionary*. New York: Dover Publications [1961].

Hogben, L. (1963). *Essential World English*. London: Michael Joseph Ltd.

Longman (2003). *Dictionary of Contemporary English*. Harlow: Pearson Educational Ltd.

Macmillan (2002). *MacMillan English Dictionary for Advanced Learners*. Oxford: MacMillan Education.

Nerrière, J.-P. & Hon, D. (2009). *Globish the World Over*. International Globish Institute.

Ogden, C.K. (1937). *The ABC of Basic English*. London: Kegan, Paul, Trench, Trubner & Co. Ltd.